

## Respondo al leteroj venintaj el 41 landoj, 4.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1988 januaro 28 kaj 30

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1988-007/SRI-1988-007-A-3-Claude-kaj-Andree-GACOND-Respondo-al-leteroj-venintaj-el-41-landoj-4.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia. Por la kvara fojo ni salutas la geaŭdantojn, kies leteroj, poŝtkartoj kaj aŭdraportoj venis el 41 landoj.

A.- El Finnlando Sakari KAUPPINEN en Vantaa skribis: "La ideoj kaj artikoloj de Hector Hodler, kiujn vi legis, estis mirinde saĝaj kaj aktualaj vortoj. Mi mem okupiĝas pri informado kaj multe pensis pri la samaj aferoj, kiujn li pritraktis jam antaŭ 80 jaroj. Bedaŭrinde multaj esperantistoj eĉ hodiaŭ ne lernis tion, sed daŭre fanfaronas pri milionoj da esperantistoj kaj esperanta paradizo post la fina venko. Ĝuste tiajn pensojn, kiajn havis Hodler, oni devas akcenti en la jubilea jaro de esperanto. Mi gratulas pro via grava eltrovo."

Cl.- Matti LAHTINEN skribis el Jyväskylä.

A.- Matti SAVELJEV en Jokela skribas: "Mi elkore dankas vin pro riĉenhavaj elsendaĵoj de via Esperanto-fako de Svisa Radio Internacia, kiuj tre bone estas aŭdeblaj en Finnlando, precipe tiuj, kiujn vi elsendas merkrede kaj sabate celitaj al specialaj direktoj." Kaj li donas ekzemplon de sukcesaj aŭskultadoj.

Cl.- Eino SYRJÄNEN en Kouvola, kiu jam ekde longa tempo kuŝas en malsanulejo aŭskultas nin el sia lito.

A.- Fine ni salutu en Finnlando Tapio TUKAINEN en Helsinki.

Cl.- El Francio skribis Stéphan BLONDEL en Créteil, kiu lernas esperanton per la metodo Assimil.

A.- Raymond BORÉ en Chambéry.

Cl.- Raymond BOURDON en Verrières-le-Buisson.

A.- Jean CALAMY en Gemenos skribis: "Mi ĉiam kaj fidele aŭskultas viajn perondajn elsendojn. Mi tre ofte surbendigas ilin, ĉar la kvalito de la ricevitaj elsendoj estas bona, precipe en la bendo de 75 metroj. Nun mi posedas 14 kasedojn, kiuj estas por mi trezoro, ĉar, kiel mi antaŭe diris al vi, malgraŭ miaj mankoj, mi malfermis kurseton. En mia najbara urbeto, Aubagne, kiu antaŭ nelonge estis tute kiel sahara dezerto koncerne esperanton. Mi havas nur 3 komencantojn kaj 4 progresantojn aŭ pli ĝuste dirite kunlernantojn. La lastan jaron tre interesis min viaj elsendoj pri la Ora Metodo de William PERRENOUD." Kaj nia aŭskultanto raportas, kiel li instruas. Lia letero povus esti bazo de interesa elsendo pri la instruado de esperanto en grupetoj.

Cl.- S-ro CHALM en Lehaure sendis amikajn pensojn de la 72-a Universala Kongreso en Varsovio skribante: "Tre malregula aŭskultanto, kiu tamen aprezas vian laboron."

A.- Sinjoro CHEVERRY en Angers sendis al ni la novan programon de Kultura Esperanto-Domo Grésillon, sciigante samtempe, ke niaj esperanto-elsendoj estas facile kapteblaj en Bauge. Ni menciuj, ke en la Kastelo Grésillon okazos kursoj kaj renkontiĝoj unue en la paska periodo: internacia infana renkonto kaj metodika seminario, kaj poste ekde mezjunio ĝis finaŭgusto: diversnivelaĵoj esperanto-kursoj, komuna verkado de romano kun Johan VALANO, promenadoj, ekskursoj, ktp. Varia kaj alloga programo.

Cl.- Skribis Michel DARTICE en Rennes.

A.- Guy DAUPHIN en Sainte Savine sendis la belan glumarkon, kiu proklamas en la franca: "Ni volas lerni esperanton en la lernejo. "

Clo.- Jacques DONY skribis, li loĝas en La Ricamarie.

A.- Maurice DEBERNARDI-DESVAUX en Nice aŭskultis nin sur la insulo Maurice.

Cl.- Madeleine DE ZILAH en Metz.

A.- Raymond DUMOULIN en Tours

Cl.- Alain FAVRE en Douvaine.

A.- Lucien GILTEAUX en Croix, kiu regule sendas al ni gazet-eltranĉaĵojn, kiuj raportas pri Svislando aŭ pri esperanto.

Cl.- Max LAINE en Champagne.

A.- Jean MANGENOOT en Sedan.

Cl.- A. LEGRET en Vire.

A.- S-ro LEMAIRE en Lyon.

Cl.- M. SEVILLA en Gujan Mestras.

A.- Hélène kaj Robert STOFFERS en Cassis ricevis franclingvan demandilon koncerne intervjuon kaj ili respondas, ke nur Plattduŝch, Hochdeutsch kaj Esperanton ili komprenas. ili kultivas etajn japanajn arbojn, Bonsai, orkideojn kaj aliajn plantojn en Cassis, loko kie la suno brilas almenaŭ po 300 tagojn jare.

Cl.- Kaj tio venigas nin en Germanion Okcidentan, kie aŭskultas nin Günther BECKER en Blieskastel.

A.- Andreas BINZINGER en Münster.

Cl.- Norbert BLUDAU en Kassel.

A.- Florin CARAGEA en Frankfurt am Main.

Cl.- Bernhard EICKHORN aŭdis Andy KÜNZLI raporti pri la malsameco de homoj ĉe Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds kaj diras, ke li spertis tion. Li fakte estas la gvidanto de la flaŭrista kaj de la kristana seminarioj kaj li agadas, por ke povu konstruiĝi en La Chaux-de-Fonds meditejo neŭtrale homa, kiun la katolikoj emas nomi kapelo Metzger.

A.- Hedwig FISCHER en Nordwalde anoncas familian semajnon, kiu okazos en pasko 1988-a. Ni legas tiun informadon pri aranĝo nun tradicia, kiu ŝajnas al ni pli koninda. Devus multiĝi la ebloj praktiki esperanton familie.

Cl.- Familia semajno dum pasko 1988-a. Germana Esperanto-Asocio invitas precipe familiojn al la kvara printempa semajno internacia, kiu okazos je 1988 marto, de la 29-a ĝis aprilo la kvina, paske, en la montaro Eifel, sude de Achen kaj Köln, kaj tute proksime al Nederlando, Belgio, Luksemburgio kaj Francio. La unuan fojon GEA ĝuos subvencion tiel, ke la kotizoj por sep plenaj tagoj estas tre malaltaj. Infanoj pagos 50 germanajn markojn, plenkreskuloj 130 germanajn markojn. La programon konsistigos esperanto-kursoj, slojdado per led, vitro kaj papero, kantado, dancado, prelegetoj kaj multaj ekskursoj en la tutan regionon. La celo estas praktiki esperanto-kulturon en internacia rondo de ĉiu-aĝuloj. Ankaŭ paroj kaj unuopaj sen infanoj estas bonvenaj, se ili ŝatas familiecan etoson. Ĉar estas nur 50 lokoj, petu tre baldaŭ aliĝilon kun pliaj informoj al Germana Esperanto-Asocio aŭ tra la kanalo de Svisa Radio Internacia.

A.- En Germanio Okcidenta ni ankoraŭ salutas Josef FISCHER en Nordwalde.

Cl.- Oliver GELLHAUS en Isny skribis por ricevi la bibliografiajn sciigojn koncerne la aŭtomatan tradukadon.

A.- Saluton al Alois HAUS en Maikammer.

Cl.- ...kaj al Hermann HEISS en Oberkirch.

A.- Karl Heinz KERSTING en Essen memoras pri nia tiam elsendo pri marmotoj. Jen ni citas lin: "Hodiaŭ mi legas artikolon de s-ro GACOND, "Marmotoj vivas en propra vilaĝo", en la revuo MONATO. Tiu artikolo memorigas min, kiam mi havis la okazon observi marmotojn malsupre de iama paŝtejo Arschle inter Zermatt kaj Täsch en Valezo. Ĉu iam mi jam povis aŭskulti la artikolon kiel prelegon dum unu el viaj elsendoj? Supozeble jes!" Fakte la revuo MONATO publikigis artikolon, kiun ni unue redaktis por Svisa Radio Internacia. Ni konstatas, ke Karl Heinz KERSTING estas atenta kaj fidela aŭskultanto.

Cl.- La venontan semajnon ni daŭrigos nian salutadon de la skribemaj geaŭdantoj, kies leteroj venis el 41 landoj. Parolis nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond, kiuj diras : Ĝis reaŭdo!